

Du jardekoj de Internacia Kongresa Universitato

Resumo

La Internacia Kongresa Universitato (IKU), antaŭe konata kiel Internacia Somera Universitato (ISU), estas daŭra kultura manifestacio kun scienca karaktero kadre de la Universalaj Kongresoj de Esperanto (UK). La artikolo detaligas la evoluon de IKU en la lastaj du jardekoj, dum kiuj ĝi multe evoluis kaj ŝanĝiĝis pro la kontribuoj de la aŭtoro: kunlaboro kun Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS), iniciato de regula dokumentado de la IKU-prelegoj, kreado de la IKU-retejo, kaj lastatempe organizado de vintra paralelaĵo al IKU – la Internacia Vintra Universitato.

1 Universitata instruado per Esperanto: ISU, IKU, AIS

Universitat-nivelaj kursoj de Esperanto okazas en pli ol cent universitatoj kaj institucioj de alta edukado en la mondo. Sed universitata Esperanto-agado havas ankaŭ duan, ne malpli gravan aspekton – *instruado kaj klerigo PER Esperanto*. Sur tiu kampo nuntempe elstaras du institucioj: Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS) kaj Internacia Kongresa Universitato (IKU).

1.1 De ISU al IKU

Dum la 17-a UK en Ĝenevo en 1925, laŭ instigo de Edmond Privat, unuafoje okazis “Somera Universitato”. La serio de sciencaj prelegoj dum UK rekomenciĝis post la Dua Mondmilito, en 1948 dum la 33-a UK en Malmö¹. UEA kreis la institucion de Internacia Somera Universitato (ISU). La nomon oni ŝanĝis al Internacia Kongresa Universitato en 1981, kiam la UK unuafoje okazis en la suda hemisfero, en Brazilo (la 66-a UK en Brasilia). Dum la (nordhemisfera) somero la UK servadas kiel organiza kadro por IKU. Temas pri daŭra kultura manifestacio kun scienca karaktero kadre de la Universalaj Kongresoj de Esperanto. Ĝian sciencan karakteron garantias la statuso de la prelegantoj, la temoj kaj la postulata nivelo de la prelegoj. La IKU-prelegoj praktike utiligas Esperanton sur la plej alta nefikcia nivelo de lingvouzo, riĉigas la lingvon per novaj terminoj bezonataj por prezenti novajn kaj ekzistantajn sciencajn kaj teknikajn nociojn kaj riĉigas la sciencajn literaturon per ĉiujara redaktita kaj presita broŝuro de prelegotekstoj. Al la publiko de UK la IKU-prelegoj ebligas ricevi profesiajn spertojn, aŭskulti bonajn lingvaĵojn kaj lerni pri variaj temoj, ofte komplikaj aŭ ne facile atingeblaj por laika publiko. La IKU ludas gravan edukadon por la komunumo de Esperanto, lingvo kiu nenie en la mondo estas uzata en kompleta publika instrusistemo, de la elementa lernejo ĝis la universitato, kaj kiu ekster la Esperanto-movado ne ludas rolon por komuniki sciencajn esplorojn.

1.2 Rilatoj inter AIS kaj IKU

La *Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino* [13] estas komuna kadro de fake elstaraj sciencistoj el la tuta mondo (proksimume 500 el dudeko da landoj), kiuj celas esplori kaj instrui sciencojn, teknikon kaj arton per Esperanto kaj per plibonigo de la internacia komunikado kaj de interfaka kunlaboro. AIS okazigis studsesiojn ne nur en siaj tradiciaj

¹ Vidu la liston “Plena Bibliografio de prelegoj en Internacia Somera Universitato 1948-1989”, 12 p. (eld. Universalaj Esperanto-Asocio, sen dato, sen loko).

centroj en San Marino kaj Germanio, sed ankaŭ en Sibiu (Rumanio), Karlovo (Bulgario) kaj Komarno (Slovakio).

La kunlaboro inter UEA kaj AIS pri komunaj AIS-IKU-sesioj komenciĝis en 1992, kiam la novelektita UEA-komisiito pri scienca agado, Amri Wandel, ekplanis kun AIS (precipe kun ĝia prezidanto Helmar Frank, iniciati kunlaboron inter AIS kaj IKU. La unua provo pri AIS-studadsesio dum la 79-a UK okazis en Seulo (1994). La unua oficiala komuna sesio de AIS kaj IKU sekvis dum la 80-a UK en Tampere, en 1995. Efektive okazis du kursoj: Hans Michael Maitzen instruis kurson pri astronomio kaj Amri Wandel pri astrofiziko. Ankaŭ realiĝis finekzamenoj, kaj la sukcesaj ekzamenoj ricevis oficialajn AIS-atestojn. Ekde tiam preskaŭ ĉiujare okazis komuna sesio de IKU kaj AIS, kiu havas tri AIS-IKU-kursojn. Ĉiu kurso komenciĝas per IKU-prelego kaj sekve havas du daŭrigajn lecionojn. Tiuj kursoj permesas pli profundan traktadon de temo kaj donas al la partoprenantoj la okazon fari ekzamenon kaj ricevi ateston de AIS. En 1997 UEA kaj AIS subskribis formalan kontrakton pri la okazigo de la komunaj sesioj. Nome de UEA subskribis la prezidanto Lee Chong Yeong kaj la estrarano pri scienca kaj faka agado Amri Wandel, kaj nome de AIS ĝia prezidanto Helmar Frank kaj senatano Hans Michael Maitzen. En 2005 estis subskribita nova, pli praktika kontrakto.

1.3 Eksteraj rilatoj

En la jaroj 1996-1998 kaj 2006 la tiama estrarano de UEA pri scienca kaj faka agado Amri Wandel plurfoje vizitis la sidejojn de Unesko kaj de Internacia Asocio de Universitatoj (IAU) en Parizo [2,3], informante pri IKU kaj AIS. Li sugestis, ke IAU rekonu IKU-n kaj AIS-n kiel universitatajn kadrojn. En 1998 IAU aperigis informon pri la UK kaj la IKU en sia oficiala kalendaro. Sekve de tiu aktivado AIS estis akceptita kiel membro de AISPL, (Internacia Asocio de Universitataj Prelegantoj kaj Lekciistoj), parenca organizaĵo de IAU.

2 IKU praktike

2.1 La formato

Kadre de IKU kutime okazas ok ĝis dek fakaj prelegoj (el kiuj tri estas parto de AIS-kurso). En la lastaj jardekoj IKU fariĝis unu el la plej prestiĝaj kaj samtempe popularaj programeroj de la UK [4]. Ĝi prezentas al centoj da aŭskultantoj prelegojn de spertuloj, profesoroj aŭ docentoj en iliaj fakoj, en terenoj tre diversaj kiel lingvistiko, literaturo, etnologio, komputiko, astronomio kaj ekonomiko. La celo de IKU estas spertigi universitat-nivelan fakan prezentadon de specifa temo. Por povi anticipe informiĝi pri la enhavo ekzistas resumo en la kongreslibro, kaj de pluraj jaroj la resumo videblas rete ĉ. du monatojn antaŭ la UK, en la IKU-retejo [12].

2.2 Elektro de la prelegoj

Por certigi altan nivelon de la prelegoj UEA starigis specialan komisionon, kiu prijuĝas la profesion nivelon de la IKU-proponoj. La unua konstanta sekretario de IKU post la Dua Mondmilito estis Ivo Lapenna (kies nomon tradicie portas la kongresa salono, en kiu okazas la IKU-prelegoj). La prijuĝa procedo estas farata de la *IKU-komisiono*. Ĝis 2004 tiu komisiono estis tri-persona, poste ĝi fariĝis kvin-persona. En la lastaj jaroj la elekto de IKU-prelegantoj fariĝis pli rigora kaj okazas laŭ specifaj kriterioj. La nuna elekto-procedo enkalkulas multajn faktorojn por garantii altan fakan nivelon, variecon de la temoj, intereson por la aŭskultantoj kaj bonan lingvan nivelon. UEA oficiale informas kaj invitas IKU-prelegantojn per reklamoj en la revuo *Esperanto* kaj per Gazetaraj Komunikaĵoj. Aldone la IKU-sekretario plue varbas en diversaj retlistoj kaj ĉe potencialaj kontribuantoj, por pligrandigi la elekton kaj diversecon de la temoj. Sekve, en la lastaj jaroj ĉiam alvenis inter duoble kaj trioble pli da proponoj

ol lokoj. Pligrandigo de la elekteblo kaj kvanto efektive garantias pli altan kvaliton. En 2005 la IKU-komisiono (precipe Christer Kiselman kaj Humphrey Tonkin) kunlabore kun la tiama UEA-estrarano pri scienca kaj faka agado, Amri Wandel, ekdiskutis laŭ-kategorian prijuĝadon de la IKU-proponoj. Aldone al la faka nivelo estis proponite, konsideri ankaŭ la lingvan nivelon, la popularecon de la temo kaj la novecon de la kandidato (por kuraĝigi novajn prelegantojn). En 2008 Wandel enkondukis novan laŭ-kategorian procedon por prijuĝi kaj sisteme kalkuli la suman meriton de ĉiu el la IKU-proponoj [6]. En tiu jaro la nombro kaj precipe la nivelo de la proponoj estis tiom altaj, ke la komisiono rekomendis akcepti du proponojn pli ol planite [10].

Alia signo de la kreskanta populariĝo kaj prestiĝo de IKU en la lastaj jaroj estas la nombro kaj kvalito de proponoj, kiu montras sisteman kreskon: por la IKU en Litovio (2005) venis 18 proponoj, en la postaj tri jaroj – 2006 (Florenco), 2007 (Jokohamo) kaj 2008 (Roterdamo) – 20-25, kaj por Bjalistoko (2009) alvenis rekorda nombro de 30 proponoj [6], kaj la varieco de temoj estis impona, kiel respegulas la sekva artikolo, originale verkita por la revuo *Esperanto*:

IKU en Bjalistoko 2009

“Socilingvistika komparo de Esperanto kaj la Jida en la Interreto” (T. Sadan), “Fonetika esploro de Esperanto” (N. Dol Salas) kaj “Teleskopoj – de Galileo ĝis la Spacteleskopo” (A. Wandel) estas la temoj de la tri AIS/IKU-kursoj de la 62-a Internacia Kongresa Universitato en Bjalistoko. Krome okazas ordinaraj IKU-prelegoj pri tre variaj temoj, kelkaj rilate al la kongresa lando kaj ĝia historio – “Pol-litva unio” (B. Despiny), “La kvin urboj de la fratoj Goskind” (T. Chmielik), pri la kongresa temo – “Esperantistaj redaktoroj de Zamenhof” (Á. Máthé), kaj pri aliaj originalaj kaj interesaj temoj kiel “Kultivi imagpovon” (M. Fettes), “Nombrado: ila, vorta, cifera” (M. La Torre) kaj “Brajlo” (O. Prytz). Tiuj naŭ IKU-prelegoj estis elektitaj el rekorda nombro de 30 proponoj, kiuj atingis la IKU-komisionon. La rikolto de proponoj estas riĉa ne nur nombre sed ankaŭ teme. Proponoj alvenis en la kampoj de astronomio, etnologio, ekonomio, edukado, historio, interpretado, komunikado, lingvistiko, literaturo, matematiko, muziko, religio, turismo, esperantologio kaj zamenhofologio. La proponoj estis profesie prijuĝitaj de la 5-persona IKU-komisiono (S. Fiedler, H.M. Maitzen, H. Tonkin, Ĵ. Wen kaj A.Wandel), kiu uzis novan procedon, unuafoje aplikitan pasintjare, taksante la proponojn laŭ faka nivelo, lingva nivelo kaj kiugrade la temo povas interesi la kongresanojn. Surbaze de la profesia rekomendo de la komisiono, la Estraro decidis pri la naŭ IKU-prelegoj.

2.3 Dokumentado de la tekstoj: la Libro kaj la Interreto

Por havi presitan dokumenton de la prelegoj A. Wandel proponis eldoni la prelegojn kiel broŝuron aĉeteblan dum la kongreso. En la 82-a UK en Adelajdo (1997) unuafoje aperis broŝuro de la IKU-tekstoj. Ekde tiam UEA regule eldonas la IKU-prelegojn broŝurforme dum la UK (aldonaĵo 1). Tiuj prelego-kolektoj (la t.n. *IKU-libro*) fariĝis la plej furora vendaĵo en la kongresa Libroservo. En la UK-oj en 2006 (Florenco) kaj 2007 (Jokohamo) elĉerpiĝis la tuta stoko de pli ol cent ekzempleroj dum la kongresa semajno [5]. En 2005 A. Wandel konstruis por IKU *retejon* [11] kadre de la repaĝaro de UEA. En la IKU-retejo antaŭ la UK aperas resumoj de la venontaj IKU-prelegoj, kaj nacilingvaj resumoj de la prelegoj, kiuj aperas ankaŭ en la IKU-libro, kaj ebligas utiligi la sciencan aranĝon por eksteraj rilatoj dum kaj post la kongreso. La IKU-dokumentado plue progresis, kiam la IKU-libro aperis ankaŭ en la Interreto, en la IKU-retejo. Unue aperis la IKU-libro de 2005, en 2006 aldoniĝis du antaŭaj libroj (de 1998, 2002) kaj sekve aldoniĝis retaj versioj de la libroj de 2006 kaj 2007. Ili estas ĉiujare videblaj en la retejo de UEA.

3 De Somera al Vintra Universitato

Se ekzistas *Somera* Universitato, kial ne ekzistu *Vintra* Universitato, kiu okazu dum la jarfinaj Esperanto-renkontiĝoj? Ekzistas pluraj tiaj tradiciaj tutsemajnaj aranĝoj dum

la novjaro, kiuj povas servi kiel kadro por prelegaro simila al IKU. En 2007 Wandel iniciatis la *Internacian Vintran Universitaton (IVU)* [7], kadre de la 24-a Internacia Festivalo (IF) en Düsseldorf. La formato estis simila al sesio de AIS/IKU dum la UK: studsesio de AIS konsistanta el tri kursoj. Fine de unu el la tri kursoj (“Marso kaj vivo ekstertera”) okazis ekzameno por la interesitaj partoprenantoj, kaj ĉ. 20 el ili sukcesis kaj ricevis oficialajn AIS-atestojn en solena ceremonio dum la silvestra balo. Sekve okazis IVU-2, kadre de la 25-a IF en 2008/9, denove en Düsseldorf. Renato Corsetti prelegis pri la temo “Lingvistikaj observoj pri Esperanto”, Eugen Macko pri “Naciaj ideologioj en Mezeŭropo”, kaj Wandel pri la temo “Teleskopoj”, okaze de la 400-jara datreveno de la invento de la astronomia teleskopo. En la tria kurso okazis ankaŭ praktika parto (observado kaj muntado de teleskopo) kaj ekzameno. La venonta – tria sesio de IVU estas planata por la 26-a IF en Noerdlingen, Bavario, 2009/10 [14]. La aŭspicio de du konataj institucioj – science AIS kaj organize la IF – donas al la IVU perspektivon fariĝi tradicia vintra kursaro, same kiel la IKU somere.

4 IKU, Esperanto kaj Scienco

Dum la 91-a Universala Kongreso de Esperanto en Florenco sian centjariĝon festis *Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)*. Omaĝe al ĝi UEA organizis specialan kunsidon, nomata Scienca Forumo [4]. En ĝi prezentis sin al la publiko la tri sciencaj instancoj de la Esperantomovado: ISAE-n prezentis ĝia prezidanto Rüdiger Sachs, AIS-n ĝia fondinta prezidanto Helmar Frank kaj IKU-n la tiama UEA-estrarano pri scienca kaj faka agado Amri Wandel. Oni notis, ke en la dudeka jarcento scienca revolucio influis ĉiun aspekton de nia vivo. Ankaŭ en Esperanto la scienco kaj tekniko manifestiĝis aparte en la interreto kaj en medioj de edukado. Ĉiuj prelegantoj emfazis, ke en la lastaj jaroj pli kaj pli videblas, ke la Internacia Lingvo progresas sur la kampo de scienco kaj tekniko. Sciencaj kaj fakaj artikoloj en planlingvo aperas ne nur en la periodaĵo de ISAE, *Scienca Revuo*, sed pli kaj pli ankaŭ en la interreto: inter la plej elstaraj estas la rapide kreskanta Esperanta *Vikipedio* kaj la Scienca-Teknika Esperanto-Biblioteko (STEB) de Eventoj, kiu kunmetas kreskantan datumbazon de malnovaj kaj novaj artikoloj kaj fakaj terminaroj. La prelegoj de la Internacia Kongresa Universitato kaj la kursoj de AIS estas rete haveblaj, aldone al la papera IKU-libro. Sciencaj kaj fakaj programeroj regule aperas en la programo de la Universalaj Kongresoj, ne nur kadre de IKU, sed ankaŭ, ekzemple, en la Esperantologia Konferenco kaj la Terminologia Forumo. Ni povas profiti tiujn novajn rimedojn por disvastigi la aplikon de Esperanto en la scienc-teknika mondo.

5 Estonte

Esperantistoj ofte argumentas, ke Esperanto povas trakti kaj esprimi ĉiujn aspektojn de la homa kulturo same bone kiel aliaj lingvoj. Unu kampo, en kiu tiu defio estas plej granda, estas la scienco, ĉar en ĝi aperas rapide kreskanta profesia terminaro kaj ĝi samtempe postulas vastan kaj rapidan informadon pri novaj rezultoj. Kvankam Esperanto ne ludas gravan rolon en la monda scienco, scienca esploro kaj altnivela edukado povas esti farataj per ĝi. IKU estas institucio, kiu demonstras tion ĉiun jaron. La IKU-libro servas kiel skriba atesto, kaj per la interreto eblas facile informi pri ĝi kaj ĝin prezenti [4]. Oni povas uzi la universitat-nivelan aktivecon per Esperanto por disvastigi la rekonon de la Internacia Lingvo en scienrilataj internaciaj forumoj kiel Unesko kaj Neregistaraj Organizaĵoj kiel Internacia Asocio de Universitatoj (IAU). Interne de la movado oni daŭrigu la popularigon de profesiaj kaj scienc-popularaj prelegoj kiel IKU en niaj kongresoj kaj kunvenoj.

Bibliografio

- Wandel, Amri (1987): "Astronomio: jen Nia Universo". En: *Heroldo de Esperanto* 63/2, p. 3; 63/3, p. 3.
- (1997): "Decidaj demarŝoj en Parizo kaj Novjorko". En: *Esperanto* 95/5, p. 84-85.
- (2006) "Novaj defioj en scienc-teknika mondo". En: *Esperanto* 99/4, p. 75; krome en *Libera Folio* (aŭgusto 2006) kaj *Azia Lanterno* (aprilo 2007), kaj "IKU kaj Esperanto en la scienco kaj tekniko", en: <http://uea.org/dokumentoj/IKU/science.html>
- (2006): "Kontaktoj ĉe Unesko". En: *Esperanto* 99/5, p. 109.
- (2007): "La nova IKU-libro pretas". En: *Esperanto* 100/7-8, p. 156.
- (2008): "Abunda IKU en Roterdamo". En: *Esperanto* 101/6, p. 129.
- (2008): "IKU-resumoj en la reto". En: *Esperanto* 101/7-8, p. 166.
- (2009): "IVU dum IF". En: *Esperanto* 102/2, p. 30.
- (2009): "IKU en Bjalistoko: kremo el 30 proponoj". En: *Esperanto* 102/5, p. 107; *Gazetaraj Komunikoj de UEA*: 316(4), februaro 2009; 321, majo 2009.
- (2009): "IKU furoris en Parizo kaj Bjalistiko". En: *Esperanto* 102/9, p.184.
- kaj Galadí-Enríquez, David (2001): *La kosmo kaj ni*. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo (2-a eld. 2005), 199 p.

Retejoj

IKU: <http://uea.org/dokumentoj/IKU>

AIS: <http://www.ais-sanmarino.org/>

IF/IVU: Internacia Vintra Universitato: <http://www.internacia-festivalo.de/>

Aldonaĵoj

1 Tekstoj de la IKU-prelegoj

- Choe Taesok; Amri Wandel (1997, Red.): *Internacia Kongresa Universitato. 19-26 julio 1997. Adelajdo, Aŭstralio*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 73 p.
- Lapenna, Ivo (1955, Red.): *Internacia Somera Universitato. Dua volumo. Elektitaj prelegoj 1949-1954*. Purmerend: Muusses, 104 p.
- Lipari, Michela (1999, Red.): *IKU. Internacia Kongresa Universitato. Berlino 31 julio-7 aŭgusto 1999*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 81 p.
- (2000, Red.): *IKU. Internacia Kongresa Universitato. Tel Avivo 26 julio-1 aŭgusto 2000*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 95 p. (+ 6paĝa aldonaĵo, teksto de Ulrich Lins).
- (2001, Red.): *IKU. Internacia Kongresa Universitato. Zagrebo 21-28 julio 2001*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 96 p.
- (2003, Red.): *IKU. Internacia Kongresa Universitato. Gotenburgo, 26 de julio – 2 aŭgusto 2003*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 83 p.
- (2004, Red.): *IKU. Internacia Kongresa Universitato. Pekino, 24 julio – 31 julio 2004*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 95 p.
- McCoy, Roy (2002, Red.): *IKU. Internacia Kongresa Universitato. Fortalezo, Brazilo 3-10 aŭgusto 2002*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 123 p.
- Vergara, José Antonio (2008, Red.): *IKU 61. Internacia Kongresa Universitato. 61-a sesio*. Roterdamo, Nederlando, 19-26 julio 2008. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 115 p.
- (2009, Red.): *IKU 63. Internacia Kongresa Universitato. 63-a sesio. 25 julio – 1 aŭgusto, Bjalistoko, Pollando*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 140 p.
- Wandel, Amri (1998, Red.): *Internacia Kongresa Universitato, 1-7 aŭgusto 1998, Montpeliero, Francio*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 88 p.
- (2005, Red.): *Internacia Kongresa Universitato, 58-a sesio, 23-30 julio 2005, Vilno*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 113 p.
- (2006, Red.): *Internacia Kongresa Universitato, 59-a sesio, 29 julio – 5 aŭgusto 2006, Florenco, Italio*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 154 p.

— (2007, Red.): *IKU 60. Internacia Kongresa Universitato, 60-a sesio, 4-11 aŭgusto 2007, Jokohamo, Japanio*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 121 p.
 Somera Universitato, Malmö 1948. Rickmansworth: Esperanto Publishing Co. 1949. 108 p.
 La IKU-libroj de 1996 (parte), 1998, 2002 kaj 2005-2007 havas ankaŭ retan version: IKU-retejo: <http://uea.org/dokumentoj/IKU>

2 Mallonga historio de IKU en la lastaj du jardekoj

- 1985/86 unuafoje IKU-prelego aperis en *Heroldo de Esperanto*
- 1994 unua provo okazigi AIS-studsesion dum UK (en Seulo)
- 1995 unua oficiala komuna sesio de AIS kaj IKU
- 1997 subskribo de kontrakto inter AIS kaj UEA pri komunaj AIS/IKU-sesioj
- 1997 unuafoje la tekstoj de la prelegoj aperas en broŝuro aĉetebla dum la UK
- 1997 UEA-estraranoj vizitas la sidejojn de Unesko kaj Internacia Asocio de Universitatoj, prezentante IKU-n
- 1998 IAU aperigas informon pri la UK kaj IKU en sia oficiala kalendaro
- 2001 unuafoje aperas faka libro (pri astronomio) bazita sur IKU-prelegoj [8]
- 2004 Christer Kiselman anstataŭas Hans Michael Maitzen kiel sekretario de la IKU-komisiono
- 2005 UEA kaj AIS subskribas la duan kontrakton de la komunaj AIS/IKU-sesioj
- 2005 instalo de IKU-retejo kadre de la UEA-retpaĝaro
- 2006 unua reta versio de la IKU-libro
- 2006/07 la IKU-libro estas la plej vendata libro en la kongresa libroservo
- 2007 A. Wandel anstataŭas C. Kiselman kiel sekretario de la IKU-komisiono
- 2008 sistema laŭkategorio procedo por prijuĝi la IKU-proponojn
- 2009 oficiala salutmesaĝo por IKU de Internacia Asocio de Universitatoj [11]

3 IKU-Rektoroj 1987-2009

- 72-a UK 1987 (40-a sesio): Juan Régulo Pérez
- 73-a UK 1988 (41-a sesio): Jan Knappert
- 74-a UK 1989 (42-a sesio): Richard Osborne
- 75-a UK 1990 (43-a sesio): Helmar Frank
- 76-a UK 1991 (44-a sesio): Ole Didrik Lærum
- 77-a UK 1992 (45-a sesio): Heiner Eichner
- 78-a UK 1993 (46-a sesio): Maria Rafaela Urueña de Hernández
- 79-a UK 1994 (47-a sesio): So Gilsu
- 80-a UK 1995 (48-a sesio): Jouko Lindstedt
- 81-a UK 1996 (49-a sesio): Vlastimil Novobilský
- 82-a UK 1997 (50-a sesio): Ron Gates
- 83-a UK 1998 (51-a sesio): Barbara Despiney
- 84-a UK 1999 (52-a sesio): Reinhard Selten
- 85-a UK 2000 (53-a sesio): Amri Wandel
- 86-a UK 2001 (54-a sesio): Dalibor Brozović
- 87-a UK 2002 (55-a sesio): José Passini
- 88-a UK 2003 (56-a sesio): Christer Kiselman
- 89-a UK 2004 (57-a sesio): Li Shijun
- 90-a UK 2005 (58-a sesio): Aloyzas Gudavičius
- 91-a UK 2006 (59-a sesio): Fabrizio Pennacchietti
- 92-a UK 2007 (60-a sesio): Gotoo Hitosi
- 93-a UK 2008 (61-a sesio): Wim Jansen
- 94-a UK 2009 (62-a sesio): Witold Stepniewski

4 Internacia Kongresa Universitato – voĉdona proceduro

La IKU-komisiono prijuĝas la IKU-proponojn ricevitajn ĝis la limdato, kaj produktas rekomendon al la Estraro.

1. La baza prijuĝo okazas laŭ tri kriterioj: (1) fakaj kvalifikoj (absolute kaj relative, t.e. rilate al la proponata temo), (2) verŝajna lingva kvalito kaj prezentad-kompetento, (3) taŭgeco de la temo (interesa; ne tro faka; komprenebla).

2. En ĉiu el tiuj tri kriterioj ĉiu komisionano aljuĝas al ĉiu propono noton en skalo de 0 ĝis 5: 5 – elstara, 4 – tre bona, 3 – bona, 2 – dubinda, 1 – malbona, 0 – evitinda.

La noto de ĉiu propono estas kalkulata laŭ la formulo $N=(2F+L+3T)/6*100$, kie F, L kaj T estas la mezumaj (normaligitaj) notoj de ĉiuj juĝantoj por tiu propono en la kategorioj “fakeco”, “lingva nivelo” kaj “taŭgeco de la temo”, respektive. Laŭ tiu ĉi skemo la mezumo de ĉiuj proponoj estas 100, kaj la plej bonaj proponoj havas notojn super 100.

3. Kaze ke membro de la komisiono estas ankaŭ proponanto, li aŭ ŝi ne povas prijuĝi sin mem, sed la aliaj notoj estas multobligataj per 5/4 (se estas kvin prijuĝantoj, kaj per la respektiva faktoro alikaze).

4. La sekretario sendas al la komisiono la rezultojn de la prijuĝo kun la sumaj notoj de ĉiuj proponoj en la tri kriterioj.

5. Propono kiu ricevis noton 0 aŭ pli ol tri notojn 1 (sume en ĉiuj kategorioj kaj de ĉiuj prijuĝantoj) ne povas esti rekomendita sen speciala aprobo de la komisiono post aparta diskuto.

6. Sekve la komisiono povas (sed ne devas) konsideri aliajn kriteriojn, kiel varieco (kiu ne rilatas al la kvalito de la unuopaj proponoj sed al la kohereco de la programo), noveco de la kandidato, rilato al la kongresa temo aŭ kongresa lando.

7. Se inter la naŭ plej altaj proponoj ne estas almenaŭ tri por IKU-AIS-kursoj, la komisiono povas antaŭenigi pli malaltajn IKU-AIS-proponojn, aŭ peti kandidatojn kun proponoj en la unuaj naŭ lokoj konsideri tamen prezenti IKU-AIS-kurson.

8. Surbaze de la notoj kaj la diskuto la IKU-sekretario produktas raporton, kiu konsistas el 9 prelegoj (el ili 3 IKU-AIS kursoj) plus 2 rezervaj, kiun li transdonas al la Estraro de UEA.

5 Message of greeting – Salutmesaĝo por IKU

On behalf of the International Association of Universities, it is my pleasure to wish the organizers and participants of the International University (IKU) taking place at the annual meeting of UEA in Bialystok best wishes for their deliberations and discussions. IAU is a global organization of universities, other higher education institutions and associations committed to promoting cooperation and sharing of expertise, knowledge and experiences that can improve and strengthen higher education worldwide. As such, we support all endeavors that can contribute to improved dialogues and understanding among higher education leaders.

We have had been following the developments related to Esperanto mainly through regular contacts with IKU secretary Amri Wandel and know that your efforts are increasingly successful and productive.

On behalf of IAU, I wish you a very successful conference and symposium.

Eva Egron-Polak

Secretary General and Executive Director

International Association of Universities

UNESCO House

Esperanta traduko

Nome de la Internacia Asocio de Universitatoj, mi havas la plezuron deziri al la organizantoj kaj partoprenantoj de la Internacia Kongresa Universitato (IKU), okazanta dum la ĉiujara kongreso de UEA en Bjalistoko, plej bonajn dezirojn por iliaj kunsidoj kaj diskutoj. IAU estas tutmonda organizaĵo de universitatoj, aliaj altedukaj institucioj kaj asocioj dediĉitaj al la antaŭenigo de kunlaborado kaj dividado de ekspertizo, scio kaj spertoj kiuj povas plibonigi kaj plifortigi la altan edukadon tutmonde. Tiel, ni subtenas ĉiujn klopodojn kiuj povas kontribui al plibonigitaj dialogoj kaj kompreno inter altedukaj gvidantoj.

Ni sekvas la disvolviĝojn rilatajn al Esperanto precipe per regulaj kontaktoj kun IKU-sekretario Amri Wandel kaj scias ke viaj provoj estas pli kaj pli sukcesaj kaj produktivaj.

Nome de IAU, mi deziras al vi tre sukcesoplenan kongreson.

Eva Egron-Polak

Ĝenerala Sekretario kaj Administra Direktoro

Internacia Asocio de Universitatoj

Unesko-Domo

Amri Wandel

Nask. 1954. Profesoro pri astrofiziko en la Hebrea Universitato de Jerusalemo kaj gastprofesoro de la Universitato de Kalifornio en Los-Anĝeleso. Ekde 1992 okupiĝas pri scienca kaj faka agado en UEA, unue kiel komisiito, dufoje kiel estrarano, nun kiel IKU-sekretario. Prezidanto de TEJO, 1981-1983; LKK-prezidanto de la 85-a UK en Tel-Avivo (2000) kaj rektoro de ĝia IKU. Membro de la Akademio de Esperanto, prezidanto de Esperanto-Ligo en Israelo, redaktoro de *Israela Esperantisto*.
